

★ TRIUMFONTA ★

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.
Tendenco: Neŭtrala - Tolerema - Esperantista - Internacia - Universala.
Aperas semajne. — Senpagaj aldonoj: „Internacia Komercio“ (praktika) kaj monata „Revuo“ (literatura, popolsciencaj).

Administristaro:
(sufiĉa adreso)
Esperanto Triumfonta,
Horrem bei Köln, Germanl.
Redaktistaro:
Ĉefredaktisto: Teo Jung.
Kunredaktistoj: M. Butin., L. K.
Literatura red.: Zanoni.
Kunlaborantoj
inter la Esperantistaro de
la tuta mondo.
Manuskriptojn oni skribu nur sur
unu flanko de l' papero.
Tarifon
vidu sur speciala folio, kiu estas al-
donata al ĉiu specimena kaj unua
numero de nova abon.

Antwerpen-Anvers, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem b.Köln, Kaunas-Kowno, Paris, Warszawa

Orienta marbanojo Zoppot en la Libera Ŝtato Danzig.

Kelkaj kabanaj de fiskaplistoj meze de dezerta lando nur ekzistis antaŭ cent jaroj: tio estis Zoppot. Sed ne ĉiam ĝi havis tiun ĉi sensignifan aspekton. Jam je la fino de l' 16-a jarcento Zoppot aperis kiel piezura antaŭloko de Danzig, kies bonstata komercistaro tie konstruigis al si kampdomojn. Estas notinde, ke kaŭze de la paco de Oliva 1660 Zoppot estis elektata kiel sidejo de multaj ambasadoroj.

Do ĉi tiu unua ekflorado malaperis. 1787 rusa ekskurso trupo dezertigis plene la lokon.

La merito estis fondito de l' propra marbanojo akiris Dr. George Haffner, unu el la iamaj francaj militkuracistoj, naskita en Elzaso, kiu dum sia unua ĉesito en Zoppot estis tiel ravita de ties beleaga situacio, ke li tuj prolektis aranĝi banejon. 1835 li starigis el propraj monorimedoj vaporbandomen kiel ankau multajn bandedojn por malvarmbano kaj igit konstrui por la tiama tempo ornaman kuracadomon. Ambaŭflanke de ĝi Dr. Haffner tuj igit armaniere surplanti la merbordanan teritorion. Tiel ke post nelonga tempo el la dezerto fariĝis malgranda agrabila banejo.

1825 estis anonciti 200 bangastoj, 1842 la unua molo estis atingita. Laŭ la multigo de la bangastoj evolucis rapide la socia vivo.

Rimarkindan pligrandigon alportis la finkonstruo de l' Danzig-Stein-a fervojo en la jaro 1870 kaj, kiel preskaŭ ĉi post la german-franca milito, tiel ankau komenciĝis je tiu tempo ĉi ĉi eksterordinara konstruagemo. Nova, kvankam ĉiam ankoraŭ simpla vaporbanejo starigis. Pli akvokonduko estis zorgata kaj, post kiam la komunumo aĉete akiris la ĝis tiam privatajn kurac-kaj baninstitulojn, oni starigis alian kuracadomon, kiu estis finkonstruita en 1880. El de la malfermita loĝo kaj precepe de la du turoj de tiu ĉi nova ornamaĵo oni havis belegan vidaĵon.

Post 20 jaroj la banlisto sumigis jam 11000 kuracistojn, kaj ĉi sekvanta jaro alportis pli grandan nombron. Komence de la nova jarcento Zoppot fariĝis urbo.

En la jaro 1910, la malnova kuracadomo, konsiderata iam kiel tre elegant, cedis al pompa novkonstruaĵo.

Ankaŭ la ĝisnuna vaporbanejo estis anstataŭita per pli granda konstruaĵo, enhavanta ĉiun modernajn aranĝojn. 1919 la kazino malfermis sian funkcion. Lukso estas ĝia stampo, kiu estas surprisita al la dume fariĝinta internacia mondbanejo. Kiel ĝenerale konata kaj tre ŝatata banejo, kun kiu kuniĝas beleaga naturo, plej elikaj kurecaj rimedoj kaj altelegant kuracivado, Zoppot solenas en la jaro 1923 la feston de sia centjara ekzistado.

Zoppot kuŝas proksime de Danzig rekte apud la maro kaj estas ĉirkaŭita de arbaraj montetoj. Milda klimato kaj pura ozonika arbar-kaj maraero distingas ĝin. Ĝiaj du grandaj marbaninstituloj kiel ankau ĝia vaporbanejo kun enspirejo estas bone aranĝitaj.

Ĉiuj medicinaj banaj, radiado per „montara suno“, elektra vibradmasaĝo ktp. estas je dispono al la kuracistoj, kiuj bezonas mallaĉigon.

La plej alta ĝis nun atingita nombro de kuracistoj estas en la jaro 1922 kaj sumigis dum la somerkuracotempo je 20597 krom la nenombrelaj pasantoj, kiuj el Danzig kaj aliaj ĉirkaŭregionoj gastiĝis en Zoppot.

Ne estas pagata kurecokla takso en Zoppot. En la vasta kuracgardeno, ornamata per brilega lumfontano kaj sur la rektapuda longa sarmara ponto precepe la eleganta kuracivado de Zoppot forte vigligas. Distinga artorkestro koncertas trifoje ĉiutage en la kuracgardeno. Bonegal

hoteloj kaj loĝejoj kun mondurban provizo, tiel same meblumitaj ĉambroj ankau kun kureluzado estas sufiĉege haveblaj.

Mondkonata estas Zoppot pro sia kazino, unuaranga entrepreno laŭ stilo de Monte Carlo, kiu konstante estas uzata de miloj da gastoj por ruleto, bakaro-kaj Trente-et-Quarante-ludoj.

Tre bona teatro, kiu same kiel la kazino somere kaj vintre estas malfermita, zorgas ankau por la distro de la bangastoj. En la riĉhava plezurprogramo de la banadministacio ne mankas ankau distingitaj kuracbaloj, korsoreturoj, banfestoj.

Unikaj estas la modelvaloraj nesupereblaj reprezentadoj de la Zoppot-a arbar-opero. Ili staras sur plej alta arta ŝtupo. Tial Zoppot oni nomas rajte la „Norda Bayreuth“. En la jaro 1922 estis reprezentata Siegfried de Wagner, 1923 oni ludos Lohengrin.

Sed ankau en sporta rilato Zoppot ludas gvidantan rolon kiel unu el la ĉefaj sportlokoj de l' Oriento. Ĉevalkurado, teniso (18 bonegal ludejoj), atletiko kaj gimnastiko, piedpilka, naĝo, vela kaj rema sportoj floradas.

En julio okazos la granda Zoppot-a Sport-emajno, sekvo de la Zoppot a Veladsemajno, dum kiu estos aranĝitaj kelkaj grandaj teatraĵoj de multaj en-kaj eksterlandaj velistaroj en la Zoppot a rado.

Kontraŭe al la plej multaj aliaj marbanojoj, kiuj post fino de la somerkuracotempo estas sennivaj kaj forlasitaj, en Zoppot regas dum la tuta jaro vigla vivo. Kazino, kur domo, hoteloj kaj loĝejoj, vaporbanejo, teatro estas malfermitaj. La vintre sporto funkcias bonegal, kiel glitkuro, giveturo, glaciĥokeo kaj skiado; baloj kaj kabareprezentadoj kiel ankau la favorita Zoppot-a karnavalo distras la ĝugalan publikon.

La kongrespartoprenontoj de la venonta Danzig-a Kongreso (Posikongreso de Nürnberg) de 10-15. aŭgusto trovos la plej bonan lokon konatiĝi kun la preferoj de ĉi tiu beleaga banloko.

L. K.

Cirkulero de la Prezidanto al la L. K.-anoj.

(Fino.)

Ne riproĉu vian Prezidanton, kiu bone konas la internacian situacion, modeste, tre modeste, aldoni tie ĉi vorton pri la elektoj en la Akademio. Li ne volas insisti kaj vere tio ne estas necesa, ĉar vi ĉiuj en la nuna periodo komprenos liajn motivojn:

Dezirinde estus, ke en la Akademio estu, kiel jam 3 (4) francoj, almenaŭ 3 (4) anĝloj kaj 3 germanoj. — Pri la ceteraj lingvoj, se ili ne estas reprezentitaj en la Akademio, laŭ la nuna Regularo (XII. 21. Aldono) la Akademio havas la rajton elekti „membrojn-korespondantojn“ kaj tion ĝi certe faros.

Dum la Nürnberga Kongreso, se sufiĉe multnombraj estos la Akademianoj, ili elektos la Prezidanton, Vicprezidanton kaj Direktorojn; se ili ne estos sufiĉe multnombraj, la elekto okazos kiel eble plej baldaŭ kaj certe antaŭ la fino de l' jaro.

Por la kongreso mi preparos:

1. Jarlibron de la lingvaj Institutoj, kiu entenos la Regularon, kun praktika komentario, kaj la planan liston de la L. K.-anoj kun adresoj, ordigitaj alfabete, laŭ la lingvoj kaj laŭ la elirjaro de ĉiu L. K.-ano.
2. Raporton pri nia agado en la lastaj jaroj kaj programon pri estonta laboro (fakaj komisionoj ktp.).

Unua sceno.

Kaporalo kaj kvin soldatoj. Serĝento Petit.

Sur la ripozejo kuŝas unu flanko de alia la Kaporalo kaj la kvin soldatoj. La Kaporalo kuŝas plej proksime ĉe la rigardantoj. Sur la benko sidas Serĝento Petit; li fumas. Li havas longajn lipharojn, senharan kapon, severan, brutan eksterajn kaj ruĝan nazon. Li estas duone ebria. — Estas la kvina horo en la mateno kaj iom mallume. — La kvina soldato sur la ripozejo, plej proksime ĉe la fundo, laŭte ronkas.

Serĝento Petit (post momento, vokas). Pichot! Pichot!
Unua soldato (eksidis). Kio estas, serĝento?
Serĝento Petit. Kiu pro la diablo tiel ronkadas?

Unua soldato. Tio estas Dubois, kiu ronkadas, serĝento.

Serĝento Petit. Tion mi pensis. Donu al li piedbaton, por ke li ĉesu!

Unua soldato. Maleble, serĝento!
Serĝento Petit (pli laŭte). Maleble!? Nenio estas malebla en la kazerno. Donu al li fortan piedbaton, mi diras ankoraŭ unu fojon!

Unua soldato. Por tio miaj kruroj estas multe tro mallongaj. Dubois kuŝas tro malproksime — tuj apud la muro, jen!

Serĝento Petit (kolere). Levu vin kaj faru, kion mi ordonis al vi!

Unua soldato (leviĝas tre malrapide, iras sur la piedfingrojn al la kvina soldato kaj donas al li fortan piedfrapon; poste li rapide, sed senbrue reiras al sia loko, kie li refoje sidigas).

Kvina soldato (subite ekvidas, frotetas sian piedbatitan kruron). Kiu diablo vekis min — en tia maniero?

Pardonu, se tiun ĉi fojon ankoraŭ (la lastan) mi petas de vi rapidan respondon: antaŭ la 12-a de junio; sed, mi ripetis, necese estas, ke ĉio estu en perfekta ordo antaŭ la kongreso. Poste la Lingvaj Institutoj estos plene reorganizitaj kaj tiam ne pli bezonos postulon tian rapidecon, kiam ni bedaŭrinde bezonis dum la unuaj malfacilaj postmilitaj jaroj.

Ne forgesu, kara kolego, ke la unua devo; sed devo de ĉiu L. K.-ano estas respondi ĉiam la al li senditajn demandarojn kaj regule voĉdoni: tio jam sufiĉas, por ke oni ne rajtu lin riproĉi pri mallaboremo. — Pri alia kunlaborado mi parolos en mia kongresa Raporto.

Saluto al la Novaj Lingva Komitatanoj.

La Lingva Komitato restu unu!
Sub jena signo ni venkos: Plena, sincera fideleco al nia Fundamento Zamenhofa, sola garantio de nia internacia unueco, ĉar tiu ĉi lasta sola povas certigi nian sukceson.

Cu blinda sintenado, kiu sine ŝtonligos la lingvon? Ne, certe ne: ĉiuj niaj laboroj pruvas la malon! Sed plenkonscia, vira sintenado de homoj firmaj, singardemaj, progresemaj, jes: progresemaj, kiuj scias, ke vera, daŭra progreso ne „salties“ sed antaŭeniras paŝo post paŝo, en plena frankvileco.

Ne finita estas la batalo: en nia paca ameco, la L. K.-anoj staras sur la unua vico.

Al ĉiuj, en kaj ekster Esperantujo, ili donu la impreson, ke ne ŝancebla estas ilia fideleco, ne rompebla ilia unueco.

Ni, L. K.-anoj, donu ankau la ekzemplon de disciplinaj ĝoj akceptita.

Kaj kuraĝe, gaje, ne dubante pri la fina venko, la armeo iros al la batalo.

La Lingva Komitato restu unu!

Tio estas nia bonvena saluto al niaj novaj kolegoj.
Via tre fidela Th. Carr,
Prez. de la L. K.

Literaturo.

Faŭst.

(1-a daŭrigota.)

Parolinte la lastan fojon pri la prahistorio de Faŭst, ni nun rigardu la originon de l' ĉefverko de Goethe. Ni unue komprenu Goethe, se ni volas kompreni lian Faŭst. Goethe estis lirika poeto; ni vidas la forte akcentitan lirikan flankon de liaj poeziaĵoj kaj ni scias, ke ĉi liaj dramoj, escepte „Götz von Berlichingen“ (Gec von Berlichingen), estas lirikal. Kuŝas en ili speciala liriko, kiu montras pure animan kaj spiritan enprofundiĝon. Ĉiuj poemoj de Goethe estas fruktoj, t. e. rezultoj el propraj travivaĵoj. Estis tipaĵo lia, poemforme fiksi ĉion, kio ekvibrigis lian animon; interna travivado igitis por li la fonto de liaj verkoj. Lia ĉefa kaj plej grava kreitaĵo, naskita el la pulsado de lia vivoforto, estas Faŭst, spegulo de lia propra vivo kaj de lia personeco.

Konate estas, ke Goethe en sia junaĝo estis ano de la doktrino de Spinoza; nur maltruis li konfesis sian disĉiplo de Leibniz, kiam li vidis la plej altan celon de homo en la klopodo fariĝi monado, t. e. individuo memstara atinginta la supron de liaj perfekteco, kiun li laŭ destino povas atingi. (Vidu: Boirac, La Monologio de Leibniz). Kaj la esenco de lia vivkompreno estis fariĝi tia monado. Tiun fortan „Mi mem“ ni perceptas en Torquato Tasso, en Ilgenio, en kiu li gloras la virinan idealon kaj la liberan homecon, ktp. Malantaŭ ĉiu verso de la Faŭstpoemo Goethe mem estas kaŝita; estante studento li ekkomencis

la verkon kaj ĝin finis okdekjarulo. Lia propra vivo estigis al li travivaĵo; en ĝi kuŝas la origino de l' ĉefverko.

Taŭgan kadron por la poemego li trovis en la figuro de la doktoro Faŭstus: Envere la poemo ne estas dramo kun precize reguligita orda sinsekvo; esence ĝi ne estas taŭga por esti sursceneje prezentata, ĉar la subtilaĵoj kaj belaj perdis ĉe prezentado. Faŭst estas pensoepoemo enhavanta senĝene kaj sen speciala ordo kunigitajn partojn kaj pensojn, kiel la verkinto ilin kreis kaj skribis.

Ni notas kvar etapojn rilate la verkon: Præfaŭsto, Fragmento, Faŭst I-a parto, Faŭst II-a parto.

La „Præfaŭsto“ Goethe neniam publikigis; li nenigis la manuskripton. Sed felika hazardo konservis al ni kopion verkitan de adorantino de Goethe. Ĉi tiu „Præfaŭsto“ enhavas tri partojn kun 21 scenoj: Monologon de Faŭst, la t. n. universitajajn scenojn kaj la tragedion de Grenio. Kun genia forto kaj profunda sento Goethe formis ĉi tiun trian parton kazaŭ eĥon de la plej intima travivaĵo, kiun la juna Goethe estis haviginta: liaj interrilatoj kun Friederike Brion, la pastrofilino el Sesenheim. La unua amtragedio en la vivo de l' geniulo, kies egoismo de l' genio perforte disirigis lin la dolĉajn katenojn, kiuj lin ligitis al la koro de la ĉarma junulino. Genio ne toleras katenojn eble malhelponajn, ke ĝi plenlibere flugante atingu la supron, la celon malkian. Goethe estis homo kaj geniulo. Agante kiel homo li mem poste devis detrui la de li „home“ kreitan, se lia neindulgema genio puŝis lin pli kaj pli supren. Tamen geniulo ne estante samtempe eĥe tute nature sentanta homo ne estas geniulo, ĉar ĉi tiu ĉerpas sian vivopovon, sian „Mi mem“ el la homo. Do, jen tragedia de poeto! Ohe la poeto ekkapitis Goethe, sed li tamen ne povis brideti sian genion kaj plendas: Du animoj loĝas, ah, en mia brusto!

Pasis la tempo de l' studado. Nova, honorriĉa vivo malfermis al Goethe sian pordon ĉe l' kortego de Weimar-a duko. Ankaŭ li mem aliĝis. Ne plu okupinte sin pri la Faŭstproblemo de post la oraj tagoj de l' junaĝo, li nun, post vojaĝo al Italujo, matura viro kaj alfranga ministro, ree meditis pri sia laboro kaj verkis la t. n. Fragmenton. Multon li forstrekis el la manuskripto de l' „Præfaŭsto“, kelkion li aldonis, sed la tuta nova elaboraĵo, kiu eĥ tute ne kontentigis la legantojn, pruvis, ke la tempo de l' granda geniulo ankoraŭ ne estis veninta. Sed lia konatiĝo kun Schiller, kies amikeco estis tre fruktodona por la „olimpano“, instigis lin denove dediĉi sin al efektiva kaj definitiva plenumo de sia vivlaboro. Ni do danku Schiller, ke li sencense instiginte la majstron zorgis pri la ĝora efektiveco. La sorto decidis, ke li mem ne plu vidu la verkegon de sia amiko; ironio de l' sorto, ĉar Schiller estis unu el la malmultaj, kiuj scias, ke la Faŭsto estas la krono de nia literaturo.

El la Præfaŭsto Goethe ĉerpis la unuan parton de la nuna formo; en la dua parto li kreis sian idealon laŭ antikva modo; la tutaĵo sin montras frukto de saĝa maljunulo ekkoninta la valoron de l' vivo kaj de l' estado mem. (Daŭrigota.) M. Butin.

Idoj de Orfeo.

La subskribinto, aŭtoro de la ĵus aperinta originala romano: Idoj de Orfeo, deklaras, ke li cedis la tutan solvendadon de tiu verko al la Anonima Societo „Centra Esperanto-Libroj“ en Den Haag (Direktoro: F. C. Koens), Bankastro 2 a. Mendoj (privatuloj kaj libristoj en ĉiuj landoj) sekve direktu sin al la supre nomita direktoro kaj ne al la aŭtoro.

Den Haag, majo 1923.

H. J. Bulthuis.

avo ronkis. Tio ŝajnas esti familia specialaĵo, kiu —

La aliaj soldatoj (ridas). Serĝento Petit (kolere interrompante). — kiu havigos al vi multajn kaj ankoraŭ pli fortajn piedbatojn, se vi ne malkutimigos ronkadon en la tempo, kiam ripozas aŭ dormas la soldatoj en la gardejoj! Cu vi komprenas?

Kvina soldato. Jen bela afero! Kiel mi povos malkutimigi — tiun familian spekt—?

Serĝento Petit. Ne direktu demandojn al superulo! Eksilentu, dormu, sed ne ronku! Cu vi komprenas?

La aliaj soldatoj (ridas). Serĝento Petit. Ne ridu! (Li rigardas tra la fenestro. Post momento:) Atenton ĉiuj! Jen la kapitano, kiu venas!

Ĉiuj (ekstaras antaŭ la dormejo en streĉita pozo).

Dua sceno.

La antaŭaj. La Kapitano.

Kapitano (eniras tra la maldekstra pordo). Ĉiuj aliaj (salutas).

Kapitano (rigardas ĉirkaŭe; al la serĝento:) Nenio nova, serĝento?

Serĝento Petit (salutante). Jes, kapitano. La forkurinta Alberto Dupuis estos ekzekutata je la sesa horo.

Kapitano (severe). Cu vi mokas min, serĝento? Tio tute ne estas io nova, eĥ ne io eksterordinara. Tiam da forkurintoj estas jam ekzekutitaj — preskaŭ ĉiutage — (Post momento.) Nenio alla?

Serĝento Petit. Nenio, kapitano.

Kapitano. Cu la serĝento Huberto sin ne prezentis denove post sia malsaĝo?

(Daŭrigota.)

MALRIĈA EN SPIRITO.

Teatraĵo en du aktoj kaj unu interakto.
Originale verkita de H. J. Bulthuis, L. K.

(4-a Daŭrigota.)

INTERAKTO.

Aktoroj.

Kapitano	
Oficiro	
Serĝento Petit	
Kaporalo	Dejorantoj
Unua soldato	en la
Dua soldato	kazerna gardejo.
Tria soldato	
Kvara soldato	
Kvina soldato	
Du armitaj soldatoj, kun serĝento.	
Serĝento Huberto.	
Johano, ekzekutota forkurinto.	

Scenoj.

En la fundo dekstre larĝa pordo; maldekstre mallarĝa pordo. Maldekstre ĉe la flankmuro longa, larĝa, oblikvaj soldatripozejo el ligno sen kovrilo. Dekstre ĉe la kontraŭa flankmuro en la mezo tre larĝa fenestro, tra kiu oni vidas la internan korton de la kazerno. Antaŭ tiu fenestro staras paralele kun la fundo larĝa tavolo kaj antaŭ ĝi senapogita benko. Sur la muroj pendas armiloj kaj bildoj kaj afiŝoj. Dekstre ĉe la flankmuro staras ses pafiloj.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Belgiu.

Spa: La urbkonsiliario elektis nian fervoran samideaninon, f-ino Jeanne Borckmans, filino de la prezidanto de la grupo kiel membron de la Komisiono de Belaj Artoj. — S-o Desonay Jean, sekretario de la grupo, ricevis la medalon de 2-a klaso de la Belga Ruĝa Kruco por servoj dum la milito.

Ĉeĥoslovakujo.

Hohenelbe. — La 12. 5. fondiĝis grupo. Fremdaj gesamideanoj, kiuj vojaĝas al kuraĉloko „Spindelmühle“, estas invitataj viziti la ĉiulundajn kunvenojn de la grupo en Hohenelbe, Hotel Bremen, Bahnhofstr.

Danujo.

Holbaek. — En tiu urbo (11000 loĝ.) instruisto Holger Hansen malfermis kurson kun 2. 20 junulinoj kaj alian kurseton por geinstruistoj.

Francujo.

Kongreso de la Esp. Federaco de la Parisa regiono (13. majo).

Matene je 9.30 h. okazis laborkunveno en la Speciala Lernejo de Publika Laboro, rue Thénard, sub prezido de Ernest Archdeacon. Laŭ la raportoj la Federaco, havinta en 1922 nur 5 grupojn, nun enkaŭkasas 20. Diversaj demandoj pri subteno al „France-Esperanto“, pri la federacia organizo kaj pri la instrukcio al la delegitoj por la nacia kongreso en Limoges estis diskutataj.

La bankedo, okazinta je 15 h. en la restoracio de l' universitato, en ĉeesto de 120 personoj, pruvis, ke Esperanto havas amikojn en ĉiuj medioj. Paroladojn Dr. Richet, membro de la Sc. kaj Med. Akademio, malnova Esperantisto; Prof. Painlevé, ekprez. de Konsilantaro de Ministroj (ĉefministro), membro de la Sc. Ak., kiu varme pledis por nia lingvo per argumentoj konvinkaj kaj aŭtoritataj; Justin Godart, deputito, kiu en 1917, estante milita vicministro, rekomendis Esperanton por la Ruĝa Kruco kaj same proponis Esperanton al la Int. Laboroficejo en 1921, kiel franca delegito; Daniel, konsilanto de la Kasacia Kortumo (la plej supera en Francujo), kiu ĉeestis preskaŭ ĉiujn kongresojn de 1905 ĝis 1914 kaj elvokis la memoron de Kapitano Bolingbroke Mudie, kiu vizitis lin du tagojn antaŭ sia morto en 1914; Kolonelo Renard, pioniro de l' aeronautiko, kiu konstruis aeroplanon kun elektrika motoro en 1884; Kolonelo Métais, reprezentanto de la framasonaro; Eyquem, hon. konsilanto de la Parisa Apelacia Kortumo, malnova samideano; Gouttenoire de Tourny, socialisto verkisto; P. Gourlay, ĉefredaktoro de komerca gazeto „Le Cuir“, kiu parolis pri siaj spertoj. Per leteroj senkulpigis s-o A. Baudet, membro de la Parisa Komerca Ĉambro, kaj nia atestimata Generalo Sebert, membro de la Sc. Akademio. Parolis ankaŭ pola, ĉeĥa, japana kaj angla samideanoj.

Vespere, en la salono de la Sindikato de Mekanikistoj kaj Kalkulonistoj de Francujo okazis spektaklo de la „Verda Kato“, kiu ludis sukcese komedion de s-ino de Gerardin „La fremda ĉapelo“ kaj koncertan parton.

Detale raportis „L'Ére Nouvelle“, „Le Quotidien“ kaj „Le Petit Parisien“.

Germanujo.

Magdeburg. — La laborista grupo aranĝis sian 4-an fondiĝintan 12. 5. per muziko, kantado, dancado ktp. La samtempe aranĝita Esp. ekspozicio estis nebone vizitata, ĉar la loka gazetaro estas malfavora.

Esperanto en la komunistaj partiaj rondoj.

Moskvo. La 23. 2 en la partia klubo de Sokolnik'a regiona komitato okazis la raporto de k-do A. Jodko pri la temo „Laborista klaso kaj Lingvo Internacia“. Post la raporto organizigis kurso kun 15 partoprenantoj.

En junulkomunistia celo de Poŝt-telegrafistoj en Brjanaka Stacidomo k-do Mit'akov gvidas kursojn por 15 anoj de Rusia junulkomunistia Ligo. (RKSM).

Junulkomunistoj de Ŝtata Universala Magazeno organizis kursojn por 15 personoj. Instruas k-do Niŝcenkov. La 6. 4. k-do Deszö Bokányi, ekskomisara popolo por Juro en Soveta Hungario, unu el la plej popularaj gvidantoj de la hungara proletariaj. dum partia kunveno de la hungaraj komunistoj-elmigrintoj, alvokis la komunistojn atenti la lingvon Internacian Esperanto, kiel potencon rimedon por unuigado de la proletariaj masoj de la tuta mondo.

En Esperantaj kursoj de la politikaj elmigrintoj studas pli ol 70 personoj diversnaciaj, inter ili grupo de infanoj de elmigrintoj, kiu partoprenis la infanan feston (9. 4.) per salutaj en Esperanto kaj kantado de revoluciaj Esp. kantoj. Instruas k-do Sotari, hungara komunisto, lerninta Esperanton en la hungaraj malliberejoj kune kun aliaj politikaj malliberuloj.

En Komunistia Universitato por Orientaj Laboruloj Esperanto estas propaganda de du ĉinoj-elmigrintoj, ambaŭ Esperantistoj.

Administraco de Komunistia Universitato por Laboruloj de Okcidentaj Malgrandnacioj responde al la propono de Centra Komitato de SEU permesis instruadon de Esp. en la klubo.

Petrogrado. En Petrograda Komunistia Universitato por Laboruloj de Okcidentaj Malgrandnacioj estas gvidataj kursoj de Esp. por 120 studentoj, unuigitaj en organizaĵoj. La studadon kaj propagadon gvidas estona politikaj elmigrinto k-do Harald Rancu, lerninta Esperanton en estonia malliberejo kune kun aliaj politikaj malliberuloj. Lebedjanj. (Tambova gub.). En la loka partii-sindikata klubo je la nomo de V. Lenin estas Esperantista rondeto.

Novozossisk (Kubano-Cernovozakaja gub.). K-do Kostin legis lecionojn pri lingvo Internacia Esperanto en la partia lernejo, kiu havis grandan sukceson inter junulkomunistoj.

Romni (Poltava gub.). En Romni'a partia lernejo organizigis Esp. rondeto „Sennaciuloj“ kaj estas gvidata kurso por 10 personoj.

St. Sentjanovka (Slavjanoserbak. ujezda, Doneca gub.). „Junulkomunistia Ligo en Sentjanovka, aŭskultinte dum la ĝenerala kunveno la alvokon de k-do Sviĉev studadi Esperanton kaj kompreninte grandan signifon de tiu ĉi lingvo por disvastigado de la komunistaj ideoj kaj por atingo de aspirata celo de la komunismo — unuigo de ĉiulandaj proletarioj — decidis senprokraste plene komenci studadon de Esperanto“. — Komenciĝis kurso por 20 junulkomunistoj.

Skopin (Rjazana gub.). La 15. 2. en la ĝenerala kunveno de la Urba Grupo de Rusia Junulkomunistia Ligo k-do Borovikov legis raporton pri signifigo de la lingvo internacia Esperanto por la proletario. Poste estis tuj organizata rondeto.

(El n-ro 3 (9), majo 1925 de „Bulteno de CK de SEU“.

Sekretario V. Polakov.

Komercio.

La Esp. budo en la Foiro de Paris

bone funkcias. Estas disdonitaj ĝis la fino ĉ. 10000 prospektaj.

Komerca Ĉambro de Paris.

Ni ricevis la raporton de s-o A. Baudet pri la Internacia Konferenco de Venezia por Komuna Komerca Lingvo, prezentita al la Komerca Ĉambro de Paris la 9-an de majo. Speciale atentinda estas la fakto, ke parto de la raporto estas presita dulingve (france kaj Esperante). Tio estas la unua okazo de uzado de Esperanto en oficiala dokumento de la Parisa Komerca Ĉambro.

Jen la rezolucio voĉdonita unuvoĉe de la Parisa Komerca Ĉambro post aŭskulto de l' raporto de s-o Baudet, en kunsido de 9-a de majo:

Konsiderante ke la Konferenco de Venezia en 1923 por Komuna Komerca Lingvo kunvenigis delegitojn de 87 komercaj ĉambroj, de 52 ekonomiaj asocioj, de 21 komercaj foiroj, de 30 turistaj organizoj, apartenantaj al 26 landoj, —

Konsiderante ke la Konferenco substrekis la rezultojn jam tre valorajn, ricevitajn per la uzado — kvankam ankoraŭ limigita — de la helpa lingvo Esperanto, —

Konsiderante ke la Internacia Konferenco konsideris la raporton kaj la deziresprimojn de la Komerca Ĉambro de Paris, datumitajn de 9. februaro 1921, kaj decidis favori al tiuj landoj la instruadon de Esperanto kaj la ĝeneraligon de ĝia uzado en la komercaj rilatoj, —

La Komerca Ĉambro de Paris esprimas la deziron: ke la komercaj ĉambroj kaj la ekonomiaj asocioj, kiuj ankoraŭ ne estas konvinkitaj pri la oportuneco de la uzado de la helplingvo Esperanto, kiel internacia kodo de korespondado kaj lingvaĵo, bonvolu meti ĉi tiun demandon al pristudo kaj provi la eksperimentojn, por kiuj la Komerca Ĉambro de Paris sin metas je ilia dispono.

Komerca propagandparolado en urbo Győr (Hungarlando).

La 29. aprilo okazis en la ĉambrego de Komerca Societo Lloyd sub aŭspicio de tiu societo kaj de la Győra Industria-Korporacio granda propagandparolado. Post saluto de la prezidanto de la Lloyd societo parlamentano D-ro Glesswein parolis pri historio kaj ideala flanko de Esperanto kaj s-o Balkányi raportis pri la praktika flanko laŭ la dokumentoj de la Venezia Konferenco. Ĉeestis multaj komercistoj kaj industriistoj, kiuj aprobis la ideojn diritajn. Jam antaŭe la lokaj gazetoj kelkfoje sciigis pri la paroladoj. Poste la gazeto Dunántul en longa ĉefartikolo raportis pri la sukcesoj. Laŭ promeso la Komerca Ĉambro de Győr mem organizos la unuan kurson.

P. B.

Aliĝo de kvar pluj ĉambroj al la Venezia Konferenco.

Laŭ la oficialaj raportoj en Venezia el Hungarlando nur la Komerca kaj Industria Ĉambro de Budapest estis reprezentita. Oni devas aldoni, ke la ĉambro de Győr oficiala sendis reprezentanton al la konferenco, pri kio la konferencia sekretario ricevis oficialan skribadon. Ĉar la ĉambroj de Debreczen, Miskolcz kaj Szeged petis la ĉambro de Budapest, ke tiu ankaŭ ilin reprezentu en Venezia, oni povas rajte skribi, ke ankaŭ tiuj ĉambroj estis reprezentitaj. Per tio al la nombro de la ĉambroj oni povas aldoni 4 novajn.

P. B.

Scienco.

La Telaŭtografio.

Laŭ „L'Intransigent“ (Parisa vespera ĵurnalo) de 11. 5., la franca administracio de P.T.T. intencas iniciati praktikan eksperimenton de sistemo de telegrafado, kiu permesos al la destino de telegramo, ricevi ĝustan reproduktion de la skribaĵo de la ekspedito. La „Telaŭtografio“, kiel oni nomas la novan sistemon, estas aplikado de inventaĵo de s-o Belin, kaj oni tuj instalas du servoliniojn: Paris—Lyon kaj Paris—Strasbourg, kiuj estas je la dispono de la publiko de post la 15. majo.

La ĉefa utilo, kiun ĝi alportas, estas ebligi la reproduktion de subskriboj, kaj sekve sennecesigi la sendadon de konfirmleteroj. Ĉu ĝi reprezentas ankaŭ la solvon de la problema pri diakritikaj signoj ĉe telegrafado?

F. E. Wadham.

Telegrafo.

Esperanto uzbla ĉe la rumanlanda telegrafado.

Pro oftaj informetoj perlene ni komunikas al la samideanaro, ke en Rumanlando telegramoj redaktitaj en Esperanto estas akceptataj laŭ oficiala cirkulero de la Ĝenerala Direktejo de la Rumana Telegrafo, datiĝa la 31-an de julio 1909 sub n-ro 40 445 kaj tekstanta jene:

„Al ĉiuj telegrafistoj en la lando kaj en stacidomoj.

Ĉar la Direktejo akceptas redaktadon de telegramoj ankaŭ en lingvo Esperanto, de post la ricevo de tiu ĉi cirkulero vi akceptos tiujn telegramojn tiel por la Interna uzo, kiel por la Internacia.

La ĝenerala direktoro: Petre A. Zahariade pm.“

La ĉifita cirkulero aperis en la tiam „Buletin Telegrafo-Postal“.

Diversaĵoj.

Rimarkinda sukceso

de la germana radiotelegrafada tekniko estas komunikita al la regna telegrafa administracio de la radiostacio Kuching en Sarawak sur insulo Borneo. Tiu ĉi 11000 km malproksima stacio observas ĉiunokte de la unua horo (mez-eŭropa tempo) la terhorizonton de la germana ĉefstacio Königswusterhausen kun la senfadna telegrafa stacio Budapest. La signalo estas aŭdebla tre klare kaj ĉiam kun la sama laŭforto. La aparatoj de la stacio Budapest estas ankaŭ konstruitaj en Germanio.

Proponata

Internacia Asocio de Cerbolaboristoj.

Antaŭ ĉ. tri jaroj s-o Henri de Jouvenel, unu el la delegitoj al la Ligo de Nacioj, fondis en Francujo Federacion de Intelektaj Laboristoj (Confédération des travailleurs intellectuels), kiu nun havas 150000 membrojn. Aliĝis ankaŭ federacioj el ok aliaj landoj. En Paris aperis antaŭ nelonge en kunveno ĉe la Sorbonne (Parisa Universitato) „observantoj“ el naŭ aliaj landoj. Oni elektis komitatojn de duoj por ĉiu federacio kaj po unu observanto por la aliaj landoj por inviti ilian aliĝon. Antaŭ la fino de la jaro oni ekzamenos malneton de konstitucio. Unu el la celoj de la ligo estas etendi la daŭron de la defendo de artista kaj literatura kiel ankaŭ de scienco kre-propraĵo ĝis okdek jaroj.

(Laŭ British Medical Journal, 21. 4. 25., tradukita Ch.-G. Stuart-Menteth.)

Internacia telefonado.

Ĉe la jarkunveno de la Asocio de Britaj Komercaj Ĉambroj s-o Herbert Shon (Newcastle) deklaris, ke internacia telefonado estas necesa el negoca kaj politika vidpunkto. Oni devus potence urgi la poŝton, ke ĝi ne nur akcelu la nunajn tre mizerajn aranĝojn, sed ankaŭ baldaŭigu la tagon, kiam oni povos sen troa prokrasto komuniĝi kun kiu ajn parto de Eŭropo.

„Rumor en Casa.“

El „De Telegraaf“ (granda holanda ĵurnalo) „Rumor in Casa“, kio tradukita signifas: „Bruo en la dometo“.

La dometo estas tiu de la Utrechta Universitato, kie alie kutimas regi tiu kvietegeco, kiu konvenas al la ekzercado de scienco. Nuntempe la profesoroj interkonsiliĝas, kaj la studentoj faras la samon. Estas aligligite, ke la „Rector Magnificus“ Prof. J. C. Naber, okaze de la daŭrenvenon de la fondo de l' Universitato parolados en latina lingvo.

Prof. Naber instruas la Roman Juron. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj li instruis ĝin latinlingve. Pri tio oni nuntempe rakontas ankoraŭ multajn anekdotojn. Ekzemple, dum la kolegio la profesoro ekkriis en la nomita lingvo: „Fermu la fenestron, ho junulo!“ Du- aŭ trifoje li tion faris, ĉar la junulo ĉe la fenestro trankvile daŭrigis la skribadon. Kiel la tuta aŭdantaro, li kutimis skribi laŭ la sono tion, kion la profesoro diktis. Tiuj ĉi junaj klasikuloj ĵus forlasintaj la gimnazion nenion komprenis de ĝi.

La Estraro de la Universitato tiam petis la profesoron, doni stajn lecionojn holandlingve, kaj li konsentis tiun ĉi peton.

Nun al li la venĝo. Nun li parolados en la latina lingvo antaŭ la universitataj estraranoj, el kiuj certe ne unu povos seki lin, — antaŭ siaj kolegoj, el kiuj eble unu el dek komprenos lin — kaj antaŭ plua aŭdantaro, ĉe kiu tiu ĉi proporcia cifero eble estos du procentoj.

Se iu demandus, kial tiu aŭdantaro ja ne forrestas? la respondo estas: en tiu solena kunsido estos disdonataj du honoraj dokortitoloj, unu al dana kaj unu al germana klerulo. Ambaŭ bonege komprenas la holandan lingvon, la unua loĝas jam longtempe en nia lando, la dua restadis dum jaroj en Nederlanda Hindujo. Sed latinan paroladon ili ambaŭ nepre ne povos kompreni.

Kiam al „Rector Magnificus“ ne estas klare, kiel neĝentile estas dum ĉeesto de fremdaj gastoj paroli lingvon, kiun tiuj ĉi ne komprenas, tiam liaj kolegoj sendube ne volos plimalagrabligi la situacion per sia forresto.

Sed — kion faros la studentoj kaj aliaj interesatoj?

Anoncetoj.

NASKIĜO. — Al gesinjoroj R. Collard-Leflexhe naskiĝis filo, nomita Jean. (Spa rue Brixhe). [1]
FIANCIGIS s-o J. P. Klerks en Egmond a. d. Hoef kaj J. van Houum, en Bergen (N. H. Nederl.) en majo 1925. [1]
GEEDZIĜO. — F-ino Jukova kaj Esper.-instruisto s-o Znamenskiĝ en Moskva geedziĝis la 29. 5. 25. [1]
EDZIĜO. — Fraŭlino Hube-dine v. Griensven el Roermond (Nederl.) kaj s-o Jan v. d. Wielen el Druten (Nederl.) geedziĝis la 16 majo. [1]
EDZIĜOPETO. — 25 jara fraŭlo (Esperantisto) kun forte konservitaj moralaj kvalitoj serĉas 17—22 jaran sinceran amikininon en sia vivo, precipe Esperantistininon. Kiu ebligas daŭrigon de universitata studado eksterlande. Seriozajn proponojn kun foto adresu al: Dimitir P. Tugarov en Pezargik (Bulg.). [2]
S O P. MĚDEM, Kaunas (Litovujo) forveturinte petas prokrastis korespondadon ĝis post la XV-a. [5]
DU HOTELFAKULOJ serĉas okupadon je ĉiuj kondiĉoj en eksterlandaj grandaj hoteloj por lerni perfekte la anglan lingvon. Proponoj al Robert Fallsmann en Trautenua (Ĉeĥosl.) Kreuzplatz, Elektragasse 1. [2]
JE MALALTA RENTUMO serĉas pruntepreni 1000 dolarojn aŭ 200 sterlingojn juna arkitekturo por pligrandigo de negoca kapitalo. Laŭ deziro garantiigita per 1-a hipoteko. Bonvolu skribi al J. Florian, arkitekturo en Velké Němčice u. Hustopeče, Ĉeĥosl. [2]

Korespondoj kaj Interŝanĝo.

Filatelistoj! Andreo Rácz en Kaposvár, Erzsebet str. 8 (Hung.) sendas 100—1000 hungarajn pm. por samkvanto de alilandaj. Deziras ankaŭ korespondi. [2]
Ni estas izolitaj, interesigu nin! Skribu letere aŭ poŝtkarie al sinjoroj Sixten Andersson, Box 59, aŭ Elis Andersson Box 25 aŭ Karl Klasen Aneberg, ĉiuj en Rödby (Sved). [2]
F-ino Elise Tham, Instr. en Hohenelbe 155 (Ĉeĥosl.) serĉas korespondadon kun ĉiuj landoj por siaj gekursanoj kaj 14-jaraĝa geknaboj: kelkaj estas filatelistoj. [2]
F-inoj Antonie Mottel kaj Trade Vortisch en Hohenelbe, Breitegasse (Ĉeĥosl.) deziras korespondi per leteroj kaj pk. kun la tuta mondo. [2]
F-ino Marg. Kunath, en Dresden-N. Kamenzerstr. 38, II. r. (Ĝerm.) deziras il. pk. el ĉiuj ĉefurboj de la mondo, let. kaj pm. [2]

Filatelio.

Poŝtmarkoj en valoro de 2000000 £

estas ekspozitaj nuntempe (14—26 majo) en la Internacia Poŝtmarka Ekspozicio (ejo: la Reĝa Hortikultura Halo en London). Tiu ekspozicio ampleksas la plej valorajn kolektojn de poŝtmarkoj, kiuj iam estis kunigitaj en unu loko. Por malbonvalutuloj la valoro de la ekspozitaj markoj estas fabela (ĉ. 5 000 000 000 gmk.). Unu sola kolekto de 5000 poŝtmarkoj veninta el Ameriko valoras 25 000 £ (625000000 gmk.). La plej valora poŝtmarko ekspozita estas la ununura konata ekzemplero de poŝtmarko de unu cendo de Brita Gujano, el la jaro 1856, la plej malofta poŝtmarko de la mondo; ĝi atingis unikan prezon de 8000 £ (200000000 gmk.) ĉe aŭkcio de la mondkonata Ferrari-kolekto.

„Internacia Komercio.“

Pro perdiĝo de la pli granda parto de la manuskriptoj survoje inter Lausanne kaj Horrem, la dua numero de „Int. Komercio“ prokrastiĝis kaj estas aldonita nur al la hodiaŭa numero. Bedaŭrinde multaj el la perdiĝintaj manuskriptoj estis originaloj kaj tial ne anstataŭigeblaj. Pro la nuntempaj malbonaj cirkonstancoj la tria numero aperos nur en julio. Espereble ĝis tiam la situacio en Rejnlando pliboniĝos, por ke — post la XV-a — „Int. Komercio“ povu eliri regule kaj ĉiunmonate. Manuskriptojn destinitajn por „Int. Komercio“ oni sendu ĝisplue al „Esperanto Triumfonta“ en Horrem bei Köln (Ĝerm.).

Internacia Sporto.

Boksado.

La boksbatalon pro la pezula majstreco de Britujo gajnis en London Joe Beckett kontraŭ Dick Smith en la 17-a rondo.

La sveda pezula majstro Persson venkis en Stockholm la germanan pezulan majstron Breitensträter en la 8-a rondo.

Piedpilkio.

La angla trupo „Westham United“ ludis en Praha kontraŭ Slavja 3:0.

Hamburg ludis la 15. 5. en Rotterdam. Rotterdam venkis per 4:1.

La Olimpiado en Göteborg.

De 1.—15. julio, la okuloj de l' sportamiko de la tuta mondo estas direktitaj al Göteborg, kie la sveda olimpiada komitato okazigos neoficialan olimpiadon. Tamen la neoficiala olimpiado en Göteborg estos pli internacia ol la lasta oficiala (1920) en Antwerpen estis kaj suzobebla la venonta en Paris estas, ĉar la olimpiadon en Göteborg povos partopreni sportistoj de ĉiuj nacioj, do ankaŭ germanoj! Tio estas la unua fojo post naŭ jaroj, ke la germana sporto pace batalas kun la sporto de la tuta mondo. Tiamaniere la olimpiado de Göteborg estos grava kulturfaktoro, ĉar ĝi akcelos la repaĉigon de la „malamikoj de hieraŭ“.

Recenzejo.

GAZETOJ.

Bulgara Esperantisto, aprilo.
Germana Esperantisto, majo.
La Progreso, aprilo.
La Revuo Orienta, marto.
Hungara Esperantisto, aprilo-majo.
Belga Esperantisto, jan.-febr.
Verda Utopio, jan.-marto.
Holanda Esperantisto, 12. 5.
La Interligilo de l' P. T. T., aprilo. Kun interesaj artikoloj, interalie pri „la aŭtomata telefono“, bedaŭrinde ne ben eraraj. — Adreso: Petro Filiidre, 84 rue Custine, Paria 18.

Leterkesto de ET.

M. G. en Huddersfield. — Ni bedaŭras ke ni ne scias adreson de Esperantisto en Schöneberg.
W. P. M. en Shepperton on Thames. — Certe vi povas uzi por „Ligilo“ ĉiun artikolon el ET.
A Chr. en New York. — Fakte ni faris la eraron, kaj vi ricevos ĝis 166.

S-o Karl Rauchhaus, en Halle a. S., Marktstr. 24 (Ĝerm.) deziras korespondi per il. pk. kaj let. kun tutmondaj gesamideanoj, interŝanĝas helpapomon de ĉiuj germanaj urboj kontraŭ monbiletoj de alia landoj. [2]

F-ino L. Szor en Lodz (Pol.). Aleja 1-ego Maja 11 deziras korespondi kun tuta mondo pri ĉiuj temoj, precipe pri Skolt-aferoj, per il. pk. kaj let. Interŝanĝas ankaŭ pm. [2]

S-o N Szor, en Lodz (Pol.). Aleja 1-ego Maja 11 deziras korespondi kun tuta mondo pri ĉiuj temoj per il. pk. kaj let. Interŝanĝas ankaŭ pm. [2]

Fraŭlo, 24-jara, deziras korespondi kun luna serioza fraŭlino por posta edziĝo. Proponoj al Alfons Rübische, fermkomercisto en Trautenua (Ĉeĥosl.). [2]

Filatelistoj! Mi deziras seriozan sinceran interŝanĝadon de pm. kun eksterlandanoj. Bankoficiisto Siegwart Keil, bei R. Schmidt en Dresden (Ĝerm.), Alvenslebenstr. 35. (Kongrevizitonto). [2]

Komerca lernanto Vasil M. Siĝkov (18-jara), str. Šipka 1885, en Tirovno (Bulg.) deziras korespondi kaj interŝanĝi il. pk. let. kaj pm. kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. [2]

S-o Erhard Hausteil, Hauptstr. 365, en Gerstorf, Bez. Chemnitz (Ĝerm.) deziras korespondi kaj interŝanĝi il. pk. kaj pm. kun ĉiuj landoj. [2]

F-ino Marg. Cleßen, Düsseldorf (Ĝerm.) Brunnenstr. 71 deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj. Donas: Danzig, Allenstein, germ. kolonioj ktp., ankaŭ librojn, Esperantistojn kontraŭ pm. Sendu nur bonajn, sufiĉe grandkvantaj, sed ne bagatelajn. [2]

Kiu bankisto el Anglujo, Danujo, Holando. Svedujo aŭ Svislando korespondos kun samprofesuloj (vizitanto la XV-an?) Kolektas ankaŭ tipe fremdlandajn bildkartojn. — s-o L. Funken, Florinsmarkt 7a I. en Koblenz (Ĝerm.). [3]

S-o A. Niŝcenkov, Moskva, B. Dmitrova 12 deziras korespondi Esperante kaj angle pri kooperaco kaj vegetarismo. [2]

Heinrich Schwarz, komercisto en Trautenua, (Ĉeĥosl.) deziras korespondi per let. kaj il. pk. kun la tuta mondo. [2]

Fritz Hanusch, Trautenua, Kirchenlaube 25 (Ĉeĥosl.) deziras korespondi per il. pk. kaj let. kun la tuta mondo. [2]

S-o Gust. Johansson, Slussen 10 en Falun (Sved.) serĉas korespondantinojn por siaj kursanoj. [3]
Filatelistoj! Al tiu, kiu sendas minim. 100 nedifektajn pm. de sia lando mi tuj sendas interŝanĝo samvalorajn de mia lando laŭ Michel, Yvert, Zumstein. — O. Weber urba oficisto en Praha VIII. 1010. (Ĉeĥosl.) [2]